

# Esperanto-Brno

## Libro de libroj

*Oldřich Arnošt Fischer*

Prelego por Societo por la Internacia Libro Esperantisto en Brno, la 18-an de septembro 2013

### **Enkonduko**

Neniu homo kapablas proksimiĝi al Dio kaj ekkoni Lin. Sed Dio, kiu amas la homaron, proksimiĝas al la homoj. Li aperas al la homo pere de Sia Vorto.

### **Kio estas la Biblio?**

En la antikva epoko libro ne havis nuntempan aspekton, ĉar tio estis volvaĵo. Tekstoj estis skribitaj sur papero, kiu estis fabrikita de marĉa planto papiro. Vorto „biblio“ devenas de papiraj volvaĵoj, kiujn oni nomis „biblioj“ („biblos“ laŭ nomo de la urbo Byblos). Pli poste la vorto estis uzata en singularo („biblio“) por volvaĵaro.

Kiu havas hejme la Biblion, tiu ne havas nur unu libron, sed grandan libraron. La Biblio konsistas de pli ol 60 partoj. Oni povas trovi tie dekretojn, diservajn instrukciojn, poemojn, kantojn, preĝojn, proverbojn, notojn pri diversaj eventoj, proklamojn, informilojn, leterojn, rememorojn pri pasintaĵoj kaj pensojn pri futuro. La Dekalogo kaj la Preĝo de la Sinjoro estas en la Biblio. Ankaŭ unu de plej belaj ampoemoj, Alta Kanto, troviĝas en la Biblio.

Kelkaj antikvaj tekstoj estis fundamento de la Biblio (tiel nomata Leĝo, kiu konsistas de kvin libroj de Moseo, libroj de Profetoj kaj kelkaj aliaj libroj). Tio estas la libroj de la unua kanono (elekto). Kiam la Biblio estis grekigita por judoj, kiuj ne komprenis hebrean lingvon (greka traduko Septuaginta, la 2-a jarcento post Kristo), kelkaj libroj estis enmetitaj en la Biblion kiel libroj de la dua kanono (elekto), Duakanonaj libroj. Krom tio ekzistas tekstoj, kiuj neniam estis enmetitaj en la Biblion (apokrifoj).

### **Libroj de la Malnova Testamento:**

*(Nomoj de Duakanonaj libroj estas skribitaj kursive.)*

Genezo (Gen), Eliro (Eli), Levidoj (Lev), Nombroj (Nom), Readmono (Rea);

Josuo (Jos), Juĝistoj (Juĝ), Rut (Rut), I. Samuel (1 Sam), II. Samuel (2 Sam), I. Reĝoj (1 Reĝ), II. Reĝoj (2 Reĝ), I. Kroniko (1 Kro), II. Kroniko (2 Kro), Ezra (Ezr), Neĥemja (Neĥ), Tobit (Tob), Judit (Jut), Ester (Est), *I. Makabeoj (1 Mak), II. Makabeoj (2 Mak)*, Ijob (Ijo), Psalmoj (Psa), Sentencoj / Proverboj (Sen), Predikanto / Kohelet, Alta Kanto (Kan), *Saĝeco (Saĝ), Sirahido (Sir)*, Jesaja (Jes), Jeremia (Jer), Plorkantoj / Lamentado (Lam), *Baruĥ (Bar)*, Jeĥezkel (Jeĥ), Daniel (Dan), Hoŝea (Hoŝ), Joel (Joe), Amos (Amo), Obadja (Oba), Jona (Jon), Miĥa (Miĥ), Naĥum (Naĥ), Ĥabakuk (Ĥab), Cefanja (Cef), Ĥagaj (Ĥag), Zeĥarja (Zeĥ) kaj Malaĥi (Mal).

Malamikoj de la Biblio asertas, ke la Malnova Testamento estas tro strikta: Okulon pro okulo, denton pro dento (Eli 21, 24). Ne la Biblio, sed homoj povas esti kruelaj, nuntempe same kiel en antikva epoko. Sed la Malnova Testamento signifis grandegan progreson

en antikva mondo, ĉar antaŭ la Malnova Testamento oni aplikis: pro unu okulo ambaŭ okulojn, pro unu dento ĉiujn dentojn. En la Malnova Testamento estis detale priskribitaj ne nur diservaj, sed ankaŭ kuracistaj reguloj. Ekzemple instrukcioj por lepruloj. Lepro ne estis nur malsano de antikva epoko, sed ĝi estas ankaŭ sana problemo de nuntempa mondo.

Ĉefa personeco de la Nova Testamento estas Jesuo Kristo. Li prezentis publike novaĵojn: amu viajn malamikojn, absolvu al tiuj, kiuj persekutas vin (Mat 5, 38-48; Luk 6, 27-36). Tio estis grandega novaĵo!

Jesuo Kristo, Filo de la Dio, humiliĝis kaj estis humiligita. Li suferis, estis krucumita kaj mortis. Sed en la tria tago li reviviĝis, nuntempe estas kun sia Patro kaj ni, kredantoj, kredas, ke li denove alvenos (Mat 24, 30; Mat 24, 36-42; Luk 21, 26-27; Apo 19, 11-21). Ni diras en aramea lingvo, en tiu sama lingvo, kiun parolis Jesuo Kristo: Maranathá! (Sinjoro, alvenu!)

### **Libroj de la Nova Testamento:**

Mateo (Mat), Marko (Mar), Luko (Luk), Johano (Joh);  
Agoj de la Apostoloj (Ago), Romanoj (Rom), I. Korintanoj (1 Kor), II. Korintanoj (2 Kor), Galatoj (Gal), Efesanoj (Efe), Filipianoj (Flp), Koloseanoj (Kol), I. Tesalonikanoj (1 Tes), II. Tesalonikanoj (2 Tes), I. Timoteo (1 Tim), II. Timoteo (2 Tim), Tito (Tit), Filemon (Flm), Hebreoj (Heb), Jakobo (Jak), I. Petro (1 Pet), II. Petro (2 Pet), I. Johano (1 Joh), II. Johano (2 Joh), III. Johano (3 Joh), Judas (Jud) kaj Apokalipso (Apo).

### **Konciza historio de la Biblio**

Libroj de la Biblio estis skribitaj en diversaj eraoj. Inter la unuaj kaj lastaj libroj estas tempa distanco de multe da jarcentoj, preskaŭ 1500 jaroj. Aŭtoroj de la Biblio estis diversaj homoj, kiuj ne havis egalan edukadon kaj vivis en diversaj eraoj.

Papiro suferis per malseko, tial ĝi estis anstataŭigita per pergameno ekde la 4-a jarcento post Kristo.

Disĉiploj kaj amikoj de Kristo memoris bone ĉiujn eventojn, sed ili aŭ mortis aŭ estis mortigitaj. Johano Baptisto kaj Paŭlo estis dekapigitaj, Petro estis krucumita, Stefano estis ŝtonmortigita.

Novan Testamenton komencis verki apostolo Paŭlo. Li skribis leterojn al kristanaj aroj en diversaj landoj.

La Biblio en nia lando estis tradukita en la 9-a jarcento. Misiistoj Konstantino (Cirilo) kaj Metodio alvenis en la jaro 863, kreis glagolican alfabeton kaj slavigis la Biblion. Ni solenis la 1150-an datrevenon de alveno de tiuj misiistoj en tiu ĉi jaro. Slava liturgio ekzistis plej longe en Monaĥejo de Sázava ĝis la jaro 1097, sed estis anstataŭigita per latina liturgio. Nur en la jaro 1346, dum regado de Karolo IV, slava liturgio estis renovigita kaj mallonge ekzistis en Prago (Emauzy, strato Na Slovanech).

La plej malnova ĉeĥa biblio estis la Leskovicana-Dresdena Biblio (1360). Tekston de la Biblio skribis sep skribistoj sur pergameno. Tiu Biblio forbrulis en Belgio en la jaro 1914.

Bedaŭrinde la Biblio fariĝis sanktaĵo, sed vere morta libro, kiu ne povis influi korojn de homoj. Dank' al edukitaj homoj, kiuj jam en la 14-a jarcento montris antagonismon inter la eklezia teorio kaj konduto de la ekleziestraro la Biblio fariĝis armilo de reformistoj de la eklezio. **Jan Milíč de Kroměříž** (1320-1325?-1374), **Konrad Waldhauser** (1326? – 1369),

**Matěj de Janov** (1350 – 1394), **Jan Želivský** (? – 1422), **Jan Hus** (1371? – 1415), **Jeronym de Prago** (1378-1380? – 1416), **Jakoubek de Stříbro** (1375? – 1429), **Václav Koranda** (? – 1453) kaj **Jan Rokycana** (1397 – 1471) estis viroj, kiuj batalis per la Biblio kontraŭ malbona ekleziestraro.

Husanoj tre aprezis la Biblion. Eĉ husanaj virinoj kapablis legi la Biblion. Eneas Silvius Piccolomini, kiu estis granda malamiko de husanoj, devis skribi, ke li observis en Bohemio, ke virinoj sciis la Biblion pli bone ol iu pastro en Italio.

La plej valorajn tradukojn de la Biblio kreis membroj de Moravia Kunfrataro en lernejo en sudmoravia urbo Ivančice en la 16-a jarcento. Tiuj tradukistoj kaj eldonistoj de la Biblio estis **Ondřej Štefan** (+ 1577), **Jan Eneáš** (+ 1594), **Izaiáš Cibulka** (+ 1582), **Mikuláš Albert de Kamének** (+ 1617), **Lukáš Helic**, **Esrom Rüdinger** (+ 1591), **Jan Hlaváč** (+ 1589), **Jiří Strejc** (+ 1599), **Jan Efraim** (+ 1600), **Pavel Jessenius** (1594), **Adam Felinus**, origine **Kocourek** (1560-1598), **Samuel Sušický** (+ 1599), **Jan Němčanský** (+ 1598), **Zachariáš Ariston** (+ 1606) kaj **Zachariáš Solín** (+ 1596). Ili tradukis ne nur el latina (Vulgata) kaj greka (Septuaginta) tradukoj de antikvaj tekstoj, sed ankaŭ el hebreaj kaj arameaj tekstoj.

**Jan Blahoslav** (1523–1571) ĉeĥigis Novan Testamenton. La traduko estis presita en kaŝita presejo de Moravia Kunfrataro en Ivančice en la jaro 1564. Post lia morto liaj kunlaborantoj tradukis Malnovan Testamenton (1577).

La Biblio de Kralice estis presita en presejo de Moravia Kunfrataro en Kralice sur Oslava en la jaroj 1579 – 1593. La sesa volumo de tiu sesvoluma Biblio estis traduko de la nova Testamento de Jan Blahoslav. Ĝi estis preta jam en la jaro 1593, sed eldonita nur en la jaro 1594. Por uzado en ordinara praktiko estis eldonitaj unuvolumaj Bibliojoj en la jaroj 1596 kaj 1613. (Oni solenis la 400-an datrevenon de tiu eldonaĵo en Kralice sur Oslava la 14-an de septembro 2013.)

Rezidejo de la presejo en fortikaĵo de Kralice sur Oslava estis atakita de rajda taĉmento de marŝalo Bukvoj (Buqoy) decembre en la jaro 1620. Kolerigitaj soldatoj vane serĉinte tie monon elĵetis metalajn literojn el fenestroj de la dua etaĝo en fosaĵon, kie jam estis multe da neĝo. Multe da literoj tial restis en tero. Tiuj literoj estis elfanditaj el aloj de tri metaloj: stano (Sn), plumbo (Pb) kaj stibio (Sb). Tial ili ne rustiĝis. Kiam **Vlasta Fialová** (1896 – 1972) arĥeologe esploris Fortikaĵon de Kralice, ŝi kaj ŝiaj kunlaborantoj, precipe lernantoj de loka baza lernejo, trovis en tero pli ol 2000 metalaj literoj. Tio estas eŭropa unikaĵo! Ekzistas multe da ekzempleroj de diversaj Bibliojoj en muzeoj, sed metalaj literoj, kiuj estis uzataj por presado, estas raraj.

### **Kiel la Biblio influas nian vivon kaj lingvon**

Malakcepti la Biblion, tio signifus malakcepti tutan kulturon. Sen bona sciado de la Biblio oni ne kapablas kompreni multe da bildoj kaj statuoj. Kvardekjara aplikado de ateismo en niaj landoj kaŭzis grandegan domaĝon. Ni ofte eĉ ne ekkonscias, kiel multe la Biblio influas nian ĉiutagan vivon.

Ĉiu konas kelkajn nomojn de la Biblio. Ĉiu konas iun Petron, Jozefon, Danielon, Paŭlon, Marian, Annan, Elizabeton.

Ĉiu infano scias fabelon pri malriĉaj infanoj, kiuj en arbaro trovis mielkukan dometon. En tiu dometo loĝis malbona sorĉistino, ĉeĥe nomata Ježibaba [jeĵibaba]. Nomo Ježibaba, tio estas ĉeĥigita nomo Jezabel. En la Biblio tiel nomiĝis edzino de reĝo Aĥab, kiu estis kruela paganino kaj persekutis profetojn (1Kr 16, 31).

Nomo de heroo Ŝimŝon (Juĝ 16, 17) estis uzita por biero (Samson). Nomo de la urbo Nazaret estas nuntempe nomo de populara muzika grupo (Nazareth).

Se ne estus la Biblio, ni ne havus nuntempan teatron. Pasionaj teatraĵoj de la 15-a jarcento kaj precipe dekoraciĉaj jezuitaj teatraĵoj estis komenco de ĉeĥa teatro.

Se ne estus la Biblio, Kristnasko fariĝus nur festo de bona manĝaĵo kaj libertempo; Pasko fariĝus nur festo de leporoj, ornamitaj ovoĵoj kaj printempa verda herbo.

En Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro de Josef Cink mi trovis multe da frazoj, kiuj devenas el la Biblio, ekzemple:

komenci de Adamo (Gen 1, 26-28),

akiradi vivopanon per ŝvito dumlabora (Gen 3, 19),

fariĝi kolono el salo (Gen 19, 26),

ne restis ŝtono sur ŝtono (Mar 13, 2),

lavi al si la manoj pri (pro) io (Mat 27, 24),

veni en aferon kiel Pilato en la kredkonfeson (= hazarde),

kavo de leonoj (Dan 6, 17-24),

bazangula ŝtono (Mat 21, 42),

sep jaroj de granda abundeco; post jaroj de abundeco venas jaroj de malsato (Gen 41, 29-30),

pentofara Magdalena (Luk 7, 36-50),

la laboranto meritas sian salajron (Luk 10, 7),

okulon pro okulo, denton pro dento (Eli 21, 24),

vi estas polvo kaj refariĝos polvo (Gen 3, 19),

neniu estas profeto en sia urbeto (Mat 13, 57),

nekredema Tomaso (Joh 20, 24-29),

babela (orgojla) turo (Gen 11, 3-8),

kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon (Joh 8, 7),

via fido vin savis (Mat 9, 22; Mar 10, 52; Luk 7, 50; Luk 8, 48),

se mi havus ĉian fidon, tiel ke mi povus formovi monton, sed ne havus amon, mi estus nenio (1Kor 13, 2).

Aliaj frazoj estas ekzemple:

harkovrita kiel Esav (Gen 25, 25),

maljuna kiel Metuŝelaĥ (Gen 5, 25-27),

egipta mallumo (Eli 10, 21-23),

fandita bovido (Eli 32, 1-32; Psa 106, 19),

kompatema samariano (Luk 10, 33-35),

iradi de Anas al Kajafas (Joh 18, 13-14, 24)  
suferi kiel Ijob (Ijo 7,5; Ijo 16, 2-18, Ijo 19, 2-22).

La Biblio en ĉeĥa lingvo helpis al kreado de la nuntempa literatura slovaka lingvo.

Verkisto Ivan Olbracht (1882-1952) aprezis signifon de la Biblio kaj por junularo verkis Bibliajn rakontojn (Biblické příběhy, 1939).

Kantoj de Jiří Voskovec (1905-1981), Jan Werich (1905-1980) kaj Jaroslav Ježek (1906-1942) pri diluvo kaj pri David kaj Goljat kuraĝigis niajn naciojn ne nur antaŭ la dua mondmilito (1938), sed ankaŭ post soveta okupado (1968), kiam ĉiuj komprenis, kiu estas David kaj kiu estas Goljat.

Usonaj negroj sciis bone la Bibliion kaj rakontis ĝin uzinte iliajn usonajn esprimojn de kolokva lingvo. Negrajn rakontojn de la Biblio kolektis kaj publikigis Roark Bradford (1896-1948). Dank' al la Biblio ni povas admiri belegajn negrajn kantojn (en nia lando kantas ilin ekzemple muzika grupo Spirituál kvintet).

Ĉeĥa-franca filmo Kreado de la Mondo (Stvoření světa/La Création du monde) de reĝisoro Eduard Hofman (1914-1987) el la jaro 1957 uzis popularajn desegnojn de Jean Effel (1908-1982). En la filmo rakontis Jan Werich kaj kantis trampa muzika grupo Settleri.

Svisa esploristo Erich von Däniken (1935) travojaĝis tutan mondon por kolekti atestojn, ke nian planedon jam vizitis eksterplanedanoj. Lia libro Memoroj pri futuro (1968) estas plena de argumentoj kaj citaĵoj el la Biblio.

Tim Rice kaj Andrew Lloyd Weber komponis rokan operon Jesuo Kristo Superstelulo (angle: Jesus Christ Superstar) en la jaro 1969. Ankaŭ samnoma filmo (1973) estis sukcesa.

En Brno loĝis poeto Václav Renč (1911-1973), kiu estis en juĝa proceso kontraŭ katolika intelektularo en la jaro 1951 kondamnita por 25 jaroj de aresto. Tiu poeto en sia poemo Cindrulino de Nazareto (Popelka nazaretská, 1969) rakontis pri Jesuo Kristo laŭ Evangelioj. La poemo estis en manuskriptaj kopioj kaŝe disvastigita en socialistaj malliberejoj. Multe da malliberuloj lernis ĝin parkrere, ĉar la Evangelio (= ĝoja novaĵo), tre helpis al ili en teruraj vivkondiĉoj de la malliberejoj.

Se ne estus la Biblio, ni ne havus nuntempan teatron. Pasionaj teatraĵoj de la 15-a jarcento kaj precipe dekoraciriĉaj jezuitaj teatraĵoj el la 17-a kaj 18-a jarcentoj – tio estis komenco de ĉeĥa teatro.

Se ne estus la Biblio, Kristnasko fariĝus nur festo de bona manĝaĵo kaj libertempo. Pasko sen la Biblio fariĝus nur festo de leporoj, ornamitaj ovoĵoj kaj verda herbo.

Giuseppe Verdi (1813-1901) komponis faman operon Nabucco (1842), pri kaptiteco de judoj dum regado de babilona reĝo Nebukadnecar II. La judojn kuraĝigis profeto Zeharja.

Ĉeĥa esperantisto Valdemar Vinař (1918-1981) ne rajtis publikigi en sia gepatra lingvo dum socialismo. Tial li verkis esperantlingve rakonton La skandalo pro Jozefo, epizodon de rakonto pri Jozefo kaj edzino de Potifar (Gen 39, 1-23). Lian libron ĉeĥigis Renata Mauserová kaj tiu libro estis ĉeĥlingve eldonita en la jaro 2001 (Skandál kolem Josefa).

### **Kiel legi la Bibliion?**

La Biblio ne estas detektiva novelo. Tio estas longa teksto kun miloj da personoj kaj agadoj. Neniu povas diri „mi scias Bibliion“, tio estos malhumileco. Sed oni povas

plibonigi siajn sciojn de la Biblio en preĝejoj aŭ per propra studado. Dum diservoj oni ofte legas fragmentojn de Malnova kaj Nova Testamentoj. Oni ankaŭ kantas psalmojn. Pastro dum sia prediko eksplikas enhavojn de tiuj bibliaj tekstoj. Kelkaj eklezioj aranĝas bibliajn kursojn. Ekzemple adventistoj havas du ekzemplerojn de la Biblio. Unu ekzemplero servas por legado, la dua ekzemplero por studado.

Propra studado estas ankaŭ necesa. Ni ne forgesu, ke post komunisma teroro atakas kredon kaj la Biblion pli danĝera malamiko, nuntempa liberalismo. Al homoj estas donataj multegaj informoj. Ĉu ĉiuj informoj, kiujn ni prenas dum la tago, estas vere valoraj? Kelkaj homoj asertas, ke ili ne havas tempon por legado de la Biblio: „Mi laboras, gajnas monon, prizogas por infanoj (genepoj, gepatroj), sportas, en televido oni nuntepe ludas novan mongolan telenovelon ... .“ Bona metodo estas havi la Biblion ĉiam proksime. Se en televido ĝuste reklamoj, vi povas tralegi eĉ nur unu alineon. Kaj post la telenovelo vi povas denove malfermi la Biblion kaj kontinui vian legadon.

Progresu de simpla al pli malfacila. Ekzemple rakonton pri Adam kaj Eva scias ĉiuj homoj. Vi povas trovi, kiujn infanojn ili havis.

Se vi ne komprenos ion, ne hontu demandi pastron.

Vi povas trovi en la Biblio lokojn, al kiuj Vi ofte revenos. Mia ŝatata libro de la Biblio estas Kohelet (Predikanto). Tiu predikanto ofte diradas: „Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.“ Kiam mi unufoje legis tion, mi ekpensis: „Tiu viro estis grandega pesimisto.“ Sed pli poste, kiam mi multfoje legis tiun libron, mi eksciis, ke la predikanto estis saĝa viro, kiu sciis multe pri vivo, amis vivon kaj estis granda optimisto.

En ĉeĥa lingvo funkcias interreta retpaĝo [www.biblionet.cz](http://www.biblionet.cz), kie oni povas serĉi citadojn de la Biblio. Ne forgesu, ke ne ĉiu, kiu citadas la Biblion, estas kristano.

Vi povas aŭskulti Radion Vatikano kaj Radion Proglas.

Kredantaj esperantistoj povas asociiĝi en du sekcioj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA). Katolikan sekcion gvidas Miloslav Šváček. Tiu sekcio nomiĝas Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj eldonas gazeton Dio Benu. Ekumenan, precipe nekatolikan, sekcion Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) gvidas Pavel Polnický. Tiu sekcio eldonas gazeton Dia Regno. Ambaŭ sekcioj havas internaciajn kontaktojn. La 66-a Kongreso de IKUE okazis en Kalwaria Zebrzydowska (Pollando) kaj la 63-an Kongreso de KELI okazis en Svitavy (Ĉeĥa Respubliko) en tiu ĉi jaro. En ambaŭ sekcioj laboras kaj kunvenas pastroj kaj profanoj, homoj, kiuj multe scias pri la Biblio.

## **Konkludo**

La plej belan informon mi lasis por fino de la prelego. Ĉio havas sian finon. Ankaŭ nia planedo iam en futuro neniĝos. Sed sciencistoj jam scias, ke ie malproksime en la universo povas esti aliaj planedoj, kiuj estas eblaj por vivo de homaro. Lasta parto de Nova Testamento estas Apokalipso. En la Apokalipso estas skribite, ke Dio preparis por la homaro novajn mondojn. La sciencistoj obtenis tiun informon en la 21-a jarcento per observadoj, kalkuloj kaj kosmaj flugoj. La sama informo estas skribita en la Biblio jam du mil da jaroj.

# Biblia kvizo

Bonvolu elekti unu de kvar respondoj (A, B, C, D):

- La Malnovan Testamenton esperantigis:**  
A: L.L. Zamenhof  
B: pastro Jan Filip  
C: pastro Martin Schleyer  
D: episkopo Jan Blahoslav
- Kiam la Eternulo ruinigis Sodomon kaj Gomoran, edzino de Lot fariĝis:**  
A: kolono el bronzo  
B: kolono el salo  
C: kolono el marmoro  
D: kolono el granito
- Esav, filo de Isaak kaj Rebeka, frato de Jakob, estis:**  
A: unuokulo  
B: harkovrulo  
C: strabulo  
D: lentugulo
- Reĝo David estis:**  
A: frato de Goljat  
B: filo de Urija, la Ĥetido  
C: filo de Saul  
D: patro de Salomono
- Moseo ricevis la Dekalogon skribitan sur ŝtonaj tabeloj. La tabeloj nuntempe estas:**  
A: en Egipta Muzeo en Kairo  
B: disrompitaj  
C: en Brita Muzeo en Londono  
D: en Juda Templo de Jerusalemo
- Ŝimŝon estis ega fortulo. Lia forteco estis en liaj:**  
A: longaj haroj  
B: brakaj muskoloj (bicepsoj)  
C: du talismanoj sur lia kolo  
D: ventraj muskoloj
- Jan Blahoslav (1523-1571) ĉefigis:**  
A: la Malnovan Testamenton  
B: la Novan Testamenton  
C: tutan Sanktan Bibliion  
D: Duonkanonajn Librojn kaj Psalmojn
- La Biblio de Kralice (1579-1593) estis eldonita:**  
A: sur monto Králický Sněžník  
B: en Kralice super Oslava  
C: en Kralice en Haná  
D: en Kralice super Radbuza
- Libron La skandalo pro Jozefo verkis ĉeĥa aŭtoro:**  
A: Waldemar Matuška  
B: Ivan Olbracht  
C: Václav Renč  
D: Valdemar Vinař
- Gepatra lingvo de Jesuo Kristo estis:**  
A: angla lingvo  
B: aramea lingvo  
C: hebrea lingvo  
D: ĥetida lingvo
- Apostolo Petro origine estis:**  
A: fiŝkaptisto  
C: soldato

B: ŝafpaŝtisto

D: ĉarpentisto

**12. Apostolo Paŭlo origine estis:**

A: ĉarpentisto

B: fiŝkaptisto

C: ŝafpaŝtisto

D: soldato

**13. Maria antaŭ nasko de Jesuo estis:**

A: edzino de Jozefo

B: servistino de Potifar

C: fianĉino de Jozefo

D: instruistino de kantado en Jeriĥo

**14. Lazaro de Betania estis:**

A: juda pirato

B: vilaĝa simulanto

C: malsanulo

D: juda kuracisto

**15. Pilato estis:**

A: romia sklavo

B: romia imperiestro

C: romia guberniestro

D: romia kuracisto

**16. Virgulino Maria iris en urbon de Judujo, por ke vizitu:**

A: familian psiĥologon

B: fratinnon Martan

C: popolan ginekologon

D: Elizabeton

**17. Nekredanta Tomaso enmetinte siajn manojn en flankon de Kristo ekkriis:**

A: Mia sinjoro kaj mia Dio!

B: Sensacio! Vi estas bravulo!

C: Mi ne kredas, tio estas nur iu truko!

D: Ni laŭdu Dion, nian Sinjoron!

**18. Stefano, la martiro, estis:**

A: ŝtonmortigita

B: dronigita en mara akvo

C: edzigita kun malbela sklavino

D: brulmortigita

**19. Negrajn rakontadojn de la Biblio kolektis kaj publikigis en Usono:**

A: Ray Bradbury

B: Rowan Atkinson

C: Robert Redford

D: Roark Bradford

**20. „Vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo.“, diradis:**

A: Moseo

B: Ijob

C: Jeremia

D: Kohelet

**21. Alta Kanto temas:**

A: pri konstruado de Babela turo

B: pri alta monto Olivarba

C: pri beleco de Jerusalema templo

D: pri la amo

**22. Nabucco (Nebukadnecar II) estis:**

A: babela reĝo

B: egipta faraono

C: turka sultano

D: persa ŝaĥo.

FINO



## Rekomendita literaturo

- AŬTORA KOLEKTIVO (1992): Encyklopedie Bible, A-L. 1-a eld., STUBHANN, M. (editoro), Bratislava, Gemini, 351 paĝoj.
- AŬTORA KOLEKTIVO (1992): Encyklopedie Bible, M-Ž. 1-a eld., STUBHANN, M. (editoro), Bratislava, Gemini, 740 paĝoj.
- AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Pismo svatĉe Starĉeho a Novĉeho zakona (vĉetnĉe deuterokanonickĉykh knih). Ekumenickĉy pĉeklad. 3-a eld., Ĉeskĉy Tĉŝin, Ĉeskĉy biblickĉy spolecnost, 283 paĝoj.
- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duonkanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Bust, B. Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eld., IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech, 1376 paĝoj.
- AŬTORA KOLEKTIVO (2008): Библия. Книги священного писания Ветхого и Нового завета 1-a eld., MoskvO, Российское Библейское общество, 1337 paĝoj.
- BERVELING, G. (2013): Pri persekutado religia. Dia Regno, 2: 32-36.
- CINK, J. (2013): Ĉesko-esperantskĉy frazeologie/Ĉeĉha-esperanta frazeologia vortaro, 1-a eld., WERNER, J. (editoro), Brno, SILE, MSD, 325 paĝoj.
- ĈAPEK, V. (1990): Historie bible. 3-a eld., Prago, Advent, 126 paĝoj.
- FIALOVĀ, V. (1971): Jan Blahoslav – zakladatel nejslavnĉjšĉy tiskĉrny Ĉeskĉykh bratrĉy. Z Kralickĉy tvrze, 5: 29-35.
- FOUILLOUX, D., LANGOIS, A., LE MOIGNĉ, A., SPIESS, F., THIBAUT, M. & TRĉBUCHON, R. (1992): Slovnik biblickĉy kultury. 1. vyd., Prago, Ewa Edition, 320 paĝoj.
- HOFMANN, G. (2012): Pri Perloj kaj Porkoj. Dia Regno, 5: 99-102.
- HUS, J. (1952): Postilla, vyloženie svatĉyĉy ĉtenĉy nedĉlnĉykh. 1-a eld., Prago, Komenskĉeho evangelickĉy fakulta bohosloveckĉy, 516 paĝoj.
- MATUCHOVĀ, M. (1971): Zprĉva z archivĉy Muzejnĉyho spolku. Z Kralickĉy tvrze, 5: 60-61.
- MUSSET, J. (1991): Kniha o Bibli – Novĉy zakon, Prago, Albatros, 261 paĝoj.
- PAPO FRANCISKO (2013): Letero de papo Francisko okaze de la solenoj de la 1150-a jubilea datreveno de la sanktaj Cirilo kaj Metodio en Velehrad. Dio Benu, 23: 58-59.
- RENĉ, V. (1991): Popelka nazaretskĉy, 1-a eld., Brno, Blok, 82 paĝoj.
- ROHLOFF, W. (2012): Dio de Abraham kaj de Isaak kaj de Jakob – Dio ne de la mortintoj, sed de la vivantoj. Dia Regno, 6: 123-126.
- SKUTIL, J. (1990): Poĉĉtky pĉsemnictvĉy na Moravĉe a cyrilometodĉjskĉy mise. Z Kralickĉy tvrze, 17: 1-3.
- ŠVĀĈEK, M. (2013): Kiel ni kongresis en Kalwaria Zebrzydowska. Dio Benu, 23: 62-71.
- TICHĀ, Z. (1984): Cesta starĉy ĉeskĉy literatury, 1-a eld., Prago, Panorama, 304 paĝoj.
- VINAŘ, V. (2001): Skandĉl kolem Josefa, 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 85 paĝoj.
- VINAŘ, V. (2002): La skandalo pro Jozefo, 2-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 88 paĝoj.
- VOSKOVEC, J. & WERICH, J. (1990): Mĉme za to (Pĉŝnovĉy teksty), 1-a eld., BLAHYNKA, M. & BLAHYNKOVĀ, K. (editoroj), Prago, Ĉeskoslovenskĉy spisovatel, 304 paĝoj.

**Korektaj respondoj de la biblia kvizo: 1A, 2B, 3B, 4D, 5B, 6A, 7B, 8B, 9D, 10B, 11A, 12D, 13C, 14C, 15C, 16D, 17A, 18A, 19D, 20D, 21D, 22A.**